# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 15 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 15
Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## KREMACIO EN BELGIO?

Kelkaj K-doj alilandaj petis al "La Materialista Ligo" fotojn k notojn pri kremaciejoj ekzistantaj en Belgio. Per peto de tiaj dokumentojn niaj korespondantoj faris al "nia kara k progresema patrio" honoron, kiun ĝi ne meritas. En tiu lando la katolika Eklezio estas ankoraŭ sufiĉe potenca por malpermesi la bruligon de niaj kadavroj, eĉ ĝi ne rezignas la grandan esperon rekonkeri sufiĉan potencon por nin bruligi antaŭ nia morto!

Tamen oni devas noti, ke la liberala partio ankaŭ estas respondeca pri la malpermeso de la kremacio, ĉar kiam ĝi regadis, ĝi nenion faris tiurilate.

Se ni estus patriotoj, ni hontus pri la deviga enterigo de la homaj kadavroj. Estas fakto pruvegita, ke la kadavroj, eĉ subtere, estas konstantaj minacoj por la sano de la vivantoj. Plie, oni devas pensi pri la drameca enterigo de homoj, kiuj ŝajnas, sed ne estas mortintaj! Kiom ofte oni devis remalfermi ĉerkojn? Kiom ofte fosistoj trovis skeletojn returnitajn en siaj ĉerkoj? Kaj kiom da tragedioj nekonataj supozigas la konataj! Certigo pri la morto ne ĉiam ekzistas, k la kuracistoj estas erarkapablaj!

Per la kulto dediĉata al la kadavroj oni povas mezuri la naivon de la kredantoj, kaj ankaŭ, pli vere, de la ateistoj honorantaj kadavrojn... La kadavro de homo, eĉ de iu famulo, ne plu estas la homo, tute kiel la kadavro de hundo ne plu estas la hundo. Ambaŭ nur estas organika materio putriĝanta, ne plu produktanta la spiriton, kiun ĝi produktis — ĝi ne plu estas sent- k penskapabla.

La senhonta ekspluatado pri tiu kulto trafe karakterizas la Eklezion. Unuparte ĝi proklamas, ke la esenca diferenco inter la homo k la hundo konsistas en la fakto, ke la homo havas k la hundo ne havas animon nematerian — k aliparte ĝi ankaŭ proklamas, ke por la homo la morto estas la apartiĝo de la animo k de la korpo... malestimenda! Ĉu el tio ne sekvas, ke dum homo kadavriĝas, ĝia animo (supozita) jam estas foririnta? Do, kiam la pastro — aŭ laŭ monpago, la pastroj! — ceremonias ĉirkaŭ homa kadavro — do senanimulo — ĉu estas malpli cinika komedio, ol se li ceremonius ĉirkaŭ hunda kadavro?

* * *

En Belgio, la malpermeso de la kremacio estas duoble absurda; ĝi ne rezultas de iu leĝo, sed nur de la religia tradicio. Antaŭ kelkaj monatoj, sinjoro Toskine (Tosquinet) (I) tre bone pruvis, ke la nura bazo leĝa pri l' afero, estas la dekreto de *Prairial*'o, jaro XII-a (de la franca revolucio), k en ĝi oni trovas nenion malpermesantan la bruligon de l' homaj kadavroj. Oni povas koleriĝi aŭ ridegi, sed fakto restas fakto: neniu leĝo malpermesas la kremacion, tamen la permeso dependas de leĝo farota...

Jam de longe la liberpensuloj burĝaj k proletaj postulas tiun leĝon: multnombraj societoj, vilaĝaj k urbaj konsilantaroj voĉdonis deziresprimojn: antaŭ kelkaj semajnoj, en la Brusela konsilantaro ankoraŭ okazis granda debato pri deziresprimo proponita de la konsilantoj d-o Marto (Marteau) k Brunfo (Brunfaut) — ambaŭ socialistoj — k Fukar (Foucard), maldekstra liberalulo. La deziresprimo estis voĉdonita kontraŭ la malplimulto klerikala k sendata al la parlamento . . . por dikigi la dokumentpakaĵon.

Nia legantaro scias, kion oni povas esperi de la burĝa k etburĝa parlamento. Tamen iun tagon la kremacio estos permesata en Belgio, kiel okazis en la ĉirkaŭaj landoj (Holando, Germanio, Francio). Sed eble oni devos pagi por sin bruligi — nur malpli ol nun (ĉar nun oni povas transportigi la kadavrojn al Parizo, aŭ alien, kie ekzistas kremaciejo, sed tio multe kostas). Tiel la permeso pagenda ne estos utila por la malriĉuloj. Tiu fakto substrekas, ke la klasbatalo ankoraŭ persistas ĝis post la morto.

Kio ajn estu, ni proletaj liberpensuloj konsekvencaj devas nepre disvolvi nian bataladon por la bruligo senpaga de l' homaj k bestaj kadavroj, ĝis ĝiaj lastaj konsekvencoj: la malapero de l' kadavrejoj. Sed tiel larĝigita, la problemo estas revolucia. Ĝia solvo postulas grandan klerigadon kontraŭreligian, do sciencan, ne fareblan en la kapitalista socio, ĉar la nura celo kapitalisma estas profito. Al ĝi estas tute indiferentaj la plej simplaj homaj problemoj. Tiu popolamasa edukado, profunda k larĝa, estas nur farebla en socio senklasa, havanta kiel bazon la laboron k ne la proprajon, kiel celon la vivon k ne la profiton.

Je la nomo de la *Materialista Ligo de Belgio.*
*Emilo Chapelier* (SAT-ano 9106), *Bruselo.*

---

## NOVA FORTIKA BATALORGANO

Aperas nun la ĉiukvintaga ateista gazeto en ukraina lingvo "Vojovniĉij Bezvirnik" (La Batalema Senkredulo), organo de l' Centra Konsilantaro de l' Asocio de Batalemaj Senkreduloj Ukrainia, malmultekosta k poramasa (eldonkvanto: 50 000!).

Estas tre kurioza la fakto, ke *sen la interveno de iu ajn el la esperantistoj,* la redakcio mem faris sub la titolo de l' gazeto la surpreson "Oni korespondas esperante" (vidinte tion, sendube, ĉe ĉiuj aliaj ateistaj gazetoj).

Tio montras, ke *la uzado de esperanto jam estiĝas ia difinita tradicio en la rondo de l' proletaj ateistaj gazetoj.*

La provizora adreso de tiu gazeto estas: Redakcia *"Vojovniĉij Bezvirnik"*, Period. Sektor D. V. U., Sergskaja Ploŝĉadj, *Ĥarkov.* *V. Elsudo.*

---

## "Malnovaj festoj kun nova titolo por ni ne estas necesaj"

Traleginte artikolon de iu K-do ("S-ulo" n-o 276) pri lia propono festi anstataŭ "Kristnaskfesto" — "Sunfeston", mi devas kontraŭdiri al tiu K-do.

Tia anstataŭigo ne estas akceptebla, ĉar laŭ mia opinio ĝi ne donos rezultojn por forpuŝi religian sensencaĵon el kapoj de malkleraj homoj.

Ni bone scias, ke sama anstataŭigo estis farita ankoraŭ antaŭe, kiam la persono de Kristo estis starigita interŝanĝe je Suno.

Por multaj "religiaj" homoj tia festo estas festo de manĝeguloj, ĉar la homaro ĝis tiu sezono ne havas ofte bonan nutradon — "plenumas faston". La naskiĝo de l' fasto estas kaŭzata de tio, ke homoj, atendinte finon de l' vintro, ŝparis nutraĵojn k, kiam la tago komencis pligrandiĝi ("kreskis Suno") k devis baldaŭ alveni printempo, ili ĝojis pri tio. Tial la komenco de l' pligrandiĝanta tag-periodo estis deklarata kiel festo, kiam oni ne plu bezonis ŝpari nutraĵojn.

Dum nuna tempo, kiam provizado je loĝataj lokoj (kompreneble ne en sovaĝa Afriko, Azio aŭ Aŭstralio) estas pli bona ol antaŭe — ŝparado de nutraĵoj fariĝas ne-necesa k kontraŭ tia tendenco — tendenco de malbona "ŝparema" nutrado ("plenumado de fasto") estas celita la bato de nia sendia agitado.

La batalo kontraŭ religia absurdo laŭ mia opinio povas fariĝi ĉefe per ekonomiaj entreprenoj (mi ne forgesas k ne diras, ke ni ne devas klarigi, agiti ktp.).

En Sovetio enkonduko de l' kvintaga seninterrompa semajno jam faris grandan paŝon al nuligo de religiaj festoj ("dimanĉoj") — ĉar ĉiu laboristo, pli vere, la kvina parto de l' tuta laboristaro, ĉiutage ripozas, k ripoztago por ili estas jam festo — ilia "dimanĉo" (se oni povas diri tiel).

Tia entrepreno malhelpas jam "prepariĝi al festo", ĉar homo okupata per laboro ne pensos pri fasto k pri